

# SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio "LANGUEDOC-ROUSSILLON"

Jarabono : 20 F al Fédération d'Esperanto du Languedoc-Roussillon  
CCP 956-28 P Montpellier

4a Kvaronjaro 1985

n° 95

## PRI RASISMO

### La Enmigrantoj kaj Ni.

Ili venas mangi nian panon. Ili kostas multe al la Socia Asekuro. Ili estas malpuraj, pigraj, mensogemaj, ŝtelemaj. Deliktuloj kaj krimuloj, ili endangerigas nian sekurecon. Ili minacas nian kulturon.

El tiuj vortoj, ofte aŭdataj en nia regiono, kie vivas multaj enmigrantoj, la plimultaj estas kalumnioj, senpravigaj asertoj. Sed en la nunaj cirkonstancoj tiaj malbonaj herboj facile kreskas sur la grundo de nia latenta ksefoncio. Oni eĉ parolas pri invado, kiu fine sufokos nian nacian identecon.

La denaskaj Francoj forgesas, ke ili mem estas praidoj de diversepokaj enmigrantoj : Iberoj, Keltoj, Fenicianoj, Grekoj, Romianoj, Vizigotoj, Frankoj, Saracenoj, Angloj - kaj tiuj migroj ofte konsistis el konkeraj invadoj, uzurpantaj alies teritorion. Iuj prognozas, ke iam Francio fariĝos Araba kolonio, kies loĝantoj trude konvertiĝos al Islamismo, kiel estis iam en Andaluzio.

Post la unua mondmilito enmigris multaj polaj kaj italaj laboristoj. Tiuj ĉi tre bone integriĝis en la franca popolo. Simile nun la Hispanoj kaj Portugaloj estas facile akceptataj. Staras problemo nur pri la afrikaj Magrebanoj kaj muzulmanaj Nigrafrikanoj.

Vere estas, ke tiuj ĉi pli malfacile asimiĝas, pro sia religio, kiu regas ilian vivon kaj ilian tutan sintenadon. Tiu religio estas ja truda kaj maltolerema. Gi malhelpas kunfandiĝon de ilia kulturo kun la nia. Same estis longe pri la Judoj, kiuj, eternaj persekutatoj, kaŭras en sia religio kaj en sia genta identeco, ne tolerante miksiĝon kun aliaj (kaj ankorau nun la kontraŭjuda antaŭjuĝo ne estas tute forigit̄ el la franca mensostato).

Tamen ni konstatas, ke la dua generacio, la gefiloj de la muzulmanaj enmigrantoj, naskitaj en Francio kaj instruitaj en niaj lernejoj, kune kun niaj, pli kaj pli similas al ili kaj adoptas iliajn morojn kaj pensmanierojn. Tiu dua generacio iom post iom franciĝas. Kaj eble tio estas unu el la kaŭzoj de la maltrankvilo de niaj mastroj, ĉar tiu asimilado fariĝas en la kadro de progresema proletaro.

Ni ne forgesu, ke antaŭ dudeko da jaroj, en periodo de ekspansio, la francaj (kaj aliaj europaj) industriaĵ mastroj, pro la bezonoj de la produktado, serĉis malmultekostan kaj obeeman manlaboriston. Ili trovis ĝin en subvoluintaj landoj, logis ĝin per la mirago de altaj salajroj, kompare kun la mizeraj vivkondiĉoj en tiuj landoj, kaj amase ĝin rekrutis kaj venigis. Nun la universala ekonomia krizo ŝrumpigis la produktadon. Dume la senkvalifikaj laboristoj estas anstataŭigebaj per robotoj, multekostaj sed efikaj, kiuj malpliigas la fabrikajn tempojn kaj kostojn, kaj havigas pli grandajn profitojn. Oni ne bezonas plu ekspluati tiujn mizerulojn, tial oni volas nun ilin forpeli kaj rejeti al ilia devenlando.

Oni akuzas ilin, ke ili prenas la lokon de francaj laboristoj, ne atentante, ke ili estas la unuaj viktimoj de la senlaboreco. Kaj la francaj laboristoj, iliaj samsortuloj, ne estas la lastaj en tiu malamika sinteno. Tiujn enmigrantojn, kiuj siatempe kontribuis al pliriĉigo de la eŭropaj landoj (kvankam ili malmulte partoprenis en ĝiaj avantaĝoj) oni volas nun resendi al ilia profunda mizerio. Ĉu juste?

Fronte al tiu rasisma ondo, kia estu nia sinteno, de ni esperantistoj? Ĉu ĝi estu tiu de naciistoj, firme ankritatj en nia genta identeco kaj ne komprenemaj al aliaj? Au ĉu, forjetante ĉian gentan antaŭjuĝon, ni aspiru al kunfandiĝo de ĉiuj homoj kulturoj, en harmonia tuthomara etoso? Kaj ĉu ni ne strebu, per nia konscia agado, al efektivigo de tiu etoso?

Ni esperantistoj estas heredantoj de universala longa kulturo. Estas nia tasko disvastigi inter niaj samtempuloj la instruon de la helenaj filozofoj, de la saĝa Judo Hilelo, de la milda Galileano Jesuo kaj de nia Majstro Zamenhof.

Valo.

\* \* \* \* \*



Amikeco trans limoj



"Amikeco trans limoj" : bone, sed ankaù Amikeco en la limoj de nia lando. La temo fariĝis sufice aktualaj pro diversaj bedaŭrindaj aferoj... kaj la baldaǔaj voĉionoj. La gravecon de tiu temo substrekas la artikolo de Valo sur la frontpaĝo.

Kion diri pri la resto de la nuna bulteno ? Fakte, ĝi ne estas tia, kia ni estus dezirintaj. Pluraj kontribuoj elvenis tre malfrue (bonvolu kontroli sur la lasta paĝo la limdaton por la sendo de viaj ĉiam tre ŝatataj artikoloj, raportoj, ktp...). Aliaj promesitaj kontribuoj ne aperis... SFS dependas de siaj legantoj !

Kompreneble, en la decembra numero, oni ne povas ne mencii kotizojn... La vivo de nia bulteno kaj de la movado ĝenerale dependas de vi.

Vi retrovos la regulajn rubrikojn pri la grupoj, pri la lastaj okazintagoj, ankaù la distran paĝon, la literaturan duon-paĝon, la gazet-eltranĉagojn... Pri tiuj lastaj, temas pri la libro de J. Amouroux, kiun ni recenzis lastfoje. Bone, ke ĵurnalistoj interesigas pri nia afero dank'al tiu leginda verko.

Eĉ se lia modesteco devas suferi, aperas alia kontribuo de J.A. pri filatelio. Jen tre lerta maniero por mencii Esperanton kaj niajn arangojn.

Alia paĝo estas en la franca (ni ne forgesu, ke kelkaj el niaj legantoj ne parolas Esperanton aǔ malmulte, do ni ne malkuraĝigu ilin - tamen tiu rekordo de paĝoj\* en la franca lingvo estas escepto...), do, tiu paĝo en la franca - por montri aǔ disdoni temoj... pri la angla. Tre ofte, niaj kontraŭdirantoj insistas, ke la angla fariĝis la internacia lingvo. Jen kelkaj argumentoj, por kompletigi la viajn.

Dum tiu aĉa sezono oni ofte revas pri vojaĝoj kaj ekzotikaj landoj. Vi trovos en tiu-ĉi numero kelkajn ideojn por viaj veontaj ferioj kaj raporto pri vojaĝo al ne-malproksima lando certe interesos vin.

Ankaù informojn pri lingvaj stagoj vi povos legi. La grupo de Béziers jam aktivas por sukcesigi nian stagon en Cassan. Se vi povas liberiĝi je tiuj datoj, eĉ por unu aǔ du tagoj, kuniĝu.

La Jaro 1986 estos signifa por ni, Esperantistoj, kun la pligrandiĝo de la "Europa komunumo" kaj la akcepto de niaj hispanaj kaj portugalaj najbaroj.

Kun 7 oficialaj lingvoj (do  $7 \times 6 = 42$  tradukistoj) ne mankis problemoj; kun 9 (do  $9 \times 8 = 72$  tradukistoj), preskaù duobligos la problemoj! Esperanto restas solvo, se ne la solvo.

Ne venis skribaj reagoj post la aperigo de la letero de la Ministro pri Edukado. Lastatempe en sia "reformo", la Ministro pri Edukado decidis limigi je 2 la nombron da lingvoj lerneblaj de iu lernanto. En la departemento Gard, la "Generala Konsilantaro" pendigis (aǔ pli precize pendigigis) afišojn kun la jena teksto : "Welcome in the nouveau Gard". Same la Regiona Konsilantaro eldonis materialon por la kataluna kaj okcitana lingvoj... kun bildo en la angla lingvo ! Vivu Esperanto !

J. Hénin.



Bonan Jaron 1986 !



langue universelle/facilite le dialogue entre les hommes



Ne estas agrable peti monon de vi en tiu periodo sed, sen via financa apogo, kion ni povas fari? La plej urĝa tasko estas ..... reaboni nian ligilon "SFS".  
 Kiel vi jam scias, la abono estas nun 20F. Vidu sur la frontpaĝo la numeron de nia poštsekonto (Fédération d'E° du Languedoc-Roussillon 355 -28 Montpellier). Nia diligenta kasistino, Lucette Mégret, Chemin des Amandiers; 34400 Lunel, por ne nomi ŝin, dankeme akceptos viajn ĉekojn!  
 Atentu, ke la federacio ne okupigas pri aliĝoj al UFE, UMA, ktp aŭ pri abonoj al E°-gazetoj.

Se vi estas membro de iu grupo, preferas firi 20F al la kaso de via grupo.  
 Ciujare okazas iom da perturbo en la kompilado de la abonoj pro negustaj adresoj, sendo de ĉekoj sen indiko de la celo, ktp. Faciliĝu la laboron de la respondeculoj, respektante tiujn simplajn regulojn. Antaŭdankon.

Kompreneble estas konsilate aliĝi al la nacia asocio kaj aboni unu aŭ plurajn E° revuojn: Jen la tarifo de la kotizo al UFE:

Aktiva membro : 185 F (ricevas "Franca Esperantisto" kaj "Espéranto-Actualités"). Parto de tiu kotizo revenas al la federacio, kiu ne havas aliajn enspezojn. Por paro, la kotizo estas 270 F.

Simila membro: 70 F (ricevas specialan numeron de "Franca Esperantisto")

JEFO: (por gejunuloj) ĝis 26 jaroj → aktiva membro : 185F (ricevas "Franca Esperantisto", "E° Actualités", "Koncize" kaj "Jefo informas". (tiu kategorio nomiĝas aktiva membro Jefo/Ufe)

→ aktiva membro (de Jefo): 70F

ricevas "Koncize" kaj "Jefo informas".

Se vi havas pli ol 25 jarojn, vi povas esti "Patrona membro" por helpi Jefo (70F)

Universala Esperanto Asocio: MJ : Membro kun Jarlibro : 76F  
 MA: "Jarlibro" kaj revuo "Esperanto" 190 F.  
 MG : Membro kun gvidlibro : 30 F  
 DM : Dumviva membro : 4750 F

#### -Aliaj konataj kotizoj aŭ abonoj:

Laute : 28 F, E° Vaucluse : 12F ; Transalpa Esperantisto : 35F, Kulturaj Kajeroj 60F  
 Heroldo : 90F ; El Popola Cinio : 90 F (tri jaroj : 21CF); Literatura Foiro: 95F,  
 Monato : 150F (aldono: "La Jaro" : 19F), La Gazeto : 150F; Sennaciulo : 125F.  
 S.A.T : 190F ; Sat-Amikaro : 110F  
 Budapešta informilo : 50F ; Bulgara Esperantisto : 20F ; Der Esperantist : 28F;  
 Paco : 50 F

FRANCA ESPERANTO- INSTITUTO: LISTO DE LA SUKCESINTOJ (en Langvedoko-Rusiljono)

ATESTO PRI LERNADO: CAYZAC Claude (B), GLUNK Cécile, GLUNK Roger, JUBERIAS Mireille (SB)  
 SOUMAH Aïssata (TB)

ATESTO PRI PRAKTIKA LERNADO : CATTIN Roselyne.

\*\*\*\*\*

Gratulon al la sukcesintoj kaj al la sindonaj kursgvidantoj.  
 Espereble, venontjare, sin prezentos pli da kandidatoj, ĉefe ĉe Atesto pri Kapableco.

La Direktorino de la Ekzamencentro:  
 Jeannine VINCENT.

NIAJN KONDOLENCOJN

al nia amiko M. Deligne (Narbonne), kiu perdis sian edzinon lastan oktoboron.

\*\*\*\*\*



16.1.48.87.07.42

Vi povas elvoki tiun numeron je iu ajn momento kaj tiel informigi pri la lastaj novaĵoj en Esperantujo. Nova mesaĝo (unu- aŭ du-minuta) estas registrata ĉiun semajnon. Prevu de tempo al tempo!

\* \* \*

## VIZITOJ DE POLAJ GEAMIKOJ

(laù raporto de la grupo de Béziers)

Dum la aûtuno ĉi vizitis nian grupon kaj urbon du esperantistoj el Pollando, unue Sro Tyblewski kaj poste S-ino Roszak. Aparte de la kunvenoj, ni provis distri niajn vizitantojn per kelkaj promenoj.

S-ro Tyblewski vizitis la muzeon de *Ensérune*, li estis tre kontenta kaj konfesis, ke li ne konsciis, ke estas tiom da antikvajoj kaj riĉajoj en la regiono.

S-ino Roszak estis tre laca post 20 prelegoj en Francio, kaj post la vizito de la urbo deziris vidi la maron. Car la vetero estis tre favora, ni povis pasigi plurajn horojn marborde kaj ŝi kolektis sakon da konkaj kaj metis la piedojn en la akvon. Ni kune vizitis la butikojn de la vendoplaco kaj tre interesis ŝin la diversaj legomoj, precipe la kaštanoj, kiujn neniam ŝi vidis. Kompreneble ni aĉetis kelkajn kaj ilia gusto multe plaĉis al ŝi.

Ofte simplaj aferoj estas tute taŭgaj por ĝojigi niajn eksterlandajn amikojn.

Ne necesas antauvidi ekskursojn aù komplikajn manĝojn.

\*\*\*\*\*

Antaù ol revojaĝi hejmen post plurmonata forestado, S-ro Tyblewski skribis el Germanio la sekantan leteron, kiun ni aperigas en la originalo. Kvankam la "P.S" ne estas tute neutrala, ni opinias, ke ni ne havas la rajton ĝin forigi. Laù fresaj informoj, oni forprenis de li la respondecon de ĉefredaktoro de "Pola Esperantisto" pro, inter aliaj, artikolo de eminenta psikiatro, kiu pritraktis la problemon de alkoholo en Pollando. S-ro T. ankaù indikis, ke estontece li laboros en la esperantista kulturcentro de La Chaux de fonds.

\* \* \* \* \*

### R A P O R T O P R I V O J A Ĝ O

Laù invito de prezidanto de Langvedoka Federacio de UFE mi faris rondvojaĝon, kiu venigis min al: Albi, Aix-en-Provence, Avignon, Bordeaux, Carcassonne, Figeac, Gujan-Mestras, Montpellier, Narbonne, Nîmes, Ste Foy La Grande, Pau, Sarlat, Salliac, Toulouse kaj kelkaj aliaj lokoj, kie mi haltis ne pro esperantistoj, sed pro miraklajoj de la naturo.

Tiu vojaĝo komencigis en Sète (per partopreno de paroliga kurso) kaj daŭris sume 6 semajnojn. Raporti ĝin koncize eblas nur post drasta decido ne mencii multajn gravajn eventojn. La kontaktoj kun esperantistoj evidentigis abundajn, kvankam ne samkvaitaj. Okazis ĉe, ke la organizantoj, kiuj elspezadis amason da energio por sukcesigi preparitajn renkontojn, ne konis esperanton!

Tamen la ĉefa valoro de oftaj (kelkfoje ĉe fascinaj) renkontoj konsistis ĝuste en la ebleco **paroli Esperante** antaù kaj kun la homoj, kiuj pli frue dubis pri ĝia uzebleco. Tiu antaŭjuĝo manifestiĝis ĉefe forte inter la franca geinstruistaro (aliflanke ĝuste la profesigrupo plejpartas en la movado!), laŭte esprimanta sian dubon. **Cu** oni tamen miru pro tio, se oni konas la Ministron?

Bani sin en la homa favorem kaj afableco - ĵen kion mi renkontis en pluraj hejmoj de afablaj francoj! Tiu dialogo ĉe nombraj tabloj, triuj rafinitaj mangajoj, en kiujn eniris la genio de la sinjorino! Tiu rememoj rojn mi prenas al Pollando, ankoraŭfoje dankante al vi - la homoj renkontitaj. Se mia letero atingis vin en ĝusta momento, vi ricevis la kroman signalon pri la simpatio.

**Dankon!**

Tybutricusz Tyblewski

P.S.

Oni starigis al mi diversajn politikajn demandojn. Kiam mi respondis akorde kun la konvinko, la riproĉo de membroj de FPK estis, ke mi parolas kiel franca televido. Tiu maniero rezoni tre similas al la konata al mi el ĉiutaga aplikado en Pollando. Mi bedaŭras!

**42-a Universala Kongreso  
Pekino, Ĉinio, 26 jul-2 aŭg 1986**

## ĈE NIAJ NAJBAROJ

### Oriente: Avignon.

Pli ol 40 personoj partoprenis en la dua rendevuo de "L-F.Koop". Gvidis la grupojn S. Keller, G. Silfer kaj P. Martinelli, kiu prezentis "Kalevala", la grandan epopeon de la finna popolo. S. Bourot prezentis per diapozitivoj la "kvin petaloj"-n. Temas pri kvin kamparaj domoj, kiuj fariĝas internacia stafejo en Bouresse (Vienne). La "Krizalido" ludis du teatraĵojn.

La tria rendevuo de LF Koop. okazos la 15an kaj 19an de Oktobro 86. Jam notu ! La venontaj departementaj kursoj okazos la 24an de Januaro kaj la 14an de Februaro.

\* \* \*

La 15an de Decembro, okaze de la Zamenhofa tago, prelegis P. Janton pri la temo "La interna ideo en 1985".

\* \* \*

### Ocidente: Toulouse.

La grupo kunvenis en restoracio ankaŭ la 15an de Decembro. Post la mango parolis D-ro Albault, oni ludis, kantis, deklamis kaj aŭskultis polan violoniston. La kontakt-adreso de la grupo estas nun 21, Rue de Verfeil 31200 Toulouse.

\* \* \*

**Pau:** Tie okazos de la 22a de Julio ĝis la 29a la "Internacia kultura kaj turisma semajno", organizata de E° Pau-Adour, La Pépinière, Av. Robert Schumann 64000 Pau. "La urbo Pau ĝuigas vin, ne nur per siaj riĉaj vidindajoj, sed ankaŭ per sia bonega situacio, ne malproksima de la maro, de la montaro, de Hispanio; inter Lourdes kaj Biarritz. Aŭtobusaj ekskursoj gvidos vin sur la Fireneojn, apud la Oceanon, tra la verde bela, nordvaska lando, inter gaspetrolaj ekstraktejoj, maizkulturoj, vitejoj. Vi gustumas la lokajn mangojn kaj vinojn. Vi ĉeestos lokajn kaj internaciajn folklorajn spektaklojn. Vi neniam forgesos la varman, amikan etoson, kiun ekde nun, la paŭaj samideanoj poluras por via ĝojo, je la plej malalta kosto, por tiu riĉoplena IKT-semajno". (N.B. Tiu "semajno" jam disvolviĝis en Nice kaj Cannes).

\* \* \*



Bedaŭrinde, ni ne povas montri al vi la belan prospekton pri tiuj vintroferioj. Ĉar la fotokopiilo ne ŝatas ĝian koloron ! Sciu tamen, ke vi povus (eĉ povas) "ferii lauvole, migradi, skimigradi, alpe skii..." en Tirolio apud Gsies (Italio) de la 27a de Decembro ĝis la 3a de Januaro aŭ/kaj de la 3a de Januaro ĝis la 10a. Samtempe vi povus (povas) praktiki la internacian lingvon kun eksterlandanoj, partopreni kursojn, aŭskulti diskutojn kaj prelegojn, danci, ktp. La tuta semajno kostas 285 DM (kontakti la delegiton en Messkirch-Germanio), speciala tarifo por gejunuloj kaj infanoj. Tiu arango ne estas escepto : samdate okazas similaj arangoj por esperantistoj en Svislando, Pollando, Bulgario, ktp por ne mencii pli tradiciajn renkontojn (tio estas kun bankedo kaj balo), ekzemple en Budapeŝto por la jarfinaj festoj. Se estas tro malfrue por tiu-ĉi fojo, jam pripensu 1986. Kaj memoru, ke ĉiutage okazas io en Esperantio, de Januaro ĝis Decembro .



# VIVO DE LA GRUPOJ

## P E R P I G N A N :

De la 31a de Oktobro ĝis la 3a de Novembro okazis la 21a Kataluna Kongreso de E<sup>o</sup>, kaj 25aj internaciaj floraj Ludoj en San Cugat del Valles (provinco de Barcelono).

Tiu bela urbo kuſas sur la orienta flanko de la Monto Tibidabo, je 12 kilometra distanco de la ĉefurbo. La inaŭguro estis tre vigla kaj entuziasmiga pro la mult-nombraj ĉeestantoj el Katalunio, Germanio, Jugoslavio kaj Italio. Ankaŭ partoprenis la Prezidanto de Tejo, Norberto Saletti kaj B. Ragnarsson, poeto el Islando kaj estrarano de UEA pri kulturo kaj edukado. La solenan malfermon prezidis la Prezidanto de la Kataluna Parlamento kaj la loka Urbestro.

La Kongreso estis tiel bone planita, la junularo tiel nombra, ke la diversnivelaj kursoj estis tre fruktodonaj. Dum la aliaj generalaj kunvenoj oni faris utilajn propo-nojn por klopodi, ke Esperanto fariĝu taŭga internacia lingvo por la homara interkom-preniĝo. La lastan tagon matene, antaŭ la fermo de la kongreso, oni inaŭguris novan straton, kiu tutsimple nomiĝas "Strato Esperanto". Post la bankedo, oni adiaŭis harmonie kaj fratece.

\* \* \*

## M O N T P E L L I E R :

Nia grupo kunvenas en "Maison pour tous Joseph Ricôme", Rue Fagès, je 20h30. Merkredon, la 2an de Oktobro, S-ro Tyblewski gvidis la kunvenon per konversaciaj ludoj. En Novembro, ni aŭdis raporton pri la kongreso de Augsburg kaj en Decembro Ges. Diez rakontis sian vojaĝon en Turkio. Ankaŭ en Oktobro (la 28an) ni vespermanĝis en restoracio kun Japana paro en "miel-luna" vojaĝo. Ni estis 15 personoj kaj la etoso estis tre agrabla. En Decembro (la 4an), Sro Duc Goninaj, el la Universitato de Aix, parolis en la salono Pétrarque; kadre de la Universitato de la tria tempo.

\* \* \*

## N I M E S :

La grupo aranĝis budon la 23an kaj 24an de Novembro, okaze de la forumo de la asocioj Standardoj de diversaj nacioj dekoraciis la budon, ankaŭ magazinoj kaj libroj de tre diversaj fontoj montris la multajn uzojn de la internacia lingvo. S-ino Soulier kaj Gesinjoroj Touron, ĉiam sindonemaj, respondis la demandojn de la vizitantoj.

\*\*\*\*\*

### ATENTON ! ERARO !



En la antaŭa numero ni anoncis la regukukan feston en Nîmes, la 18an de Januaro, de la 14a ĝis la 18a horo, en Centro Pablo Neruda, salono 308, 1a etaĝo...

La kotizo estas ja 15 F sed la indikita poštĉekkonto..... ne ekzistas!

Do sendi la ĉekon al "S-ino G. Soulier -213, Avenue de Camargue, 30120 Caissargues).

\* \* \*

## B E Z I E R S :

Mankis en la lasta SFS informoj pri niaj kursoj, jen ili:

{-Veraj komencantoj : merkrede, je 14h15 ĉe S-ino Authier.

{-Progresantoj : Vendredo je 14h30, en la klubejo (Caserne St Jacques) kun Sro Peray.

{-Perfektiga kurso : Lunde, je 19h30 ĉe S-ino Authier.

Post la vizito de S-ro Tyblewski, gastis S-ino Roszak, ankaŭ el Pollando; ŝi restadis 3 tagojn. Tiamaniere ni povis prezenti la prelegon 2 fojojn : la unua okazis publike en saloneto de la Kongrespalaco, ĉeestis 27 personoj, grupanoj sed ankaŭ neesperantistoj; la dua disvolviĝis en Foyer Alcmel (eks-foyer Maif), ĉirkau 50 emeritaj geinstruistoj venis kaj ŝajnis interesitaj sed neniu petis informojn pri esperanto (tamen ni klarigis al ili, kial la metiista arta teamo nomiĝas "Galerio 87" kun la celo de la U.K. en Varsovio). Pri la vizito de S-ino Roszak vidu apartan raporteton.

Nun nia grupo preparas la majan semajnfinon en Cassan. Aliĝu frue !

\* \* \*

## C O N G R E S

### E s p e r a n t o e t c a t a l a n

Le congrès de l'Association esperantiste de Catalogne vient de se tenir à Sant-Cugat dels-Valles (Catalogne Espagnole) en présence de 250 délégués. Le Centre culturel esperantiste de Perpignan était représenté par son président le majoral Llech-Walter et par deux de ses membres, Mme Empar-Noguer et Jean Fernandez. Le congrès était placé sous la présidence effective de M. Coll i Alentorn, président du Parlement Catalan

Après les séances de travail, place fut faite au tourisme avec la visite du magnifique site roman constitué par l'église et le cloître de Sant-Cugat.

Le Comité directeur de l'Association esperantiste catalane a interrogé les délégués perpignanais sur l'éventuelle possibilité d'organiser un congrès à Perpignan une de ces prochaines années. Question à laquelle il devait être répondu positivement.

(*"Midi Libre"* - la 8an de Novembro 1985)

"**L'INDEPENDANT**" 4, rue Emmanuel Brousse - B.P. 443  
66004 PERPIGNAN CEDEX

## Salses

### Un recteur dans les rues de Salses

Le comité espérantiste  
communique :

La revue "Contient" (en librairie ou chez l'éditeur — "Les Castors" — 66500 Prades) vient de publier une très intéressante étude sur l'"Histoire du mouvement espérantiste en Roussillon" du début du siècle à nos jours.

En 114 pages abondamment illustrées, le lecteur est mis en contact avec les Roussillonnais qui, au cours des décennies, ont œuvré pour une meilleure compréhension entre les peuples par l'adoption de l'espéranto, la langue internationale neutre et auxiliaire.

Les Salséens, en particulier, découvrent la personnalité très attachante d'Emile Boirac, recteur de l'université de Dijon, membre correspondant de l'Institut et philosophe éminent, conseiller et ami du Docteur Zamenhof.

Le recteur Boirac sera le premier président de l'académie d'espéranto et, en compagnie de sa femme originaire de Salses, il assistera aux premiers congrès universels d'espéranto.

Il était à la veille de voir consacrer définitivement son nom parmi les savants spécia-

lisés dans le domaine de l'occultisme quand éclata la Première Guerre mondiale.

Il mourut à Salses le 20 septembre 1917.

Quelques octogénaires de notre cité se souviennent encore du temps où le recteur se livrait à des phases d'occultisme et de magnétisme et il serait particulièrement intéressant de rassembler les souvenirs épars sur ce sympathique visage d'un homme

de cœur pratiquement inconnu dans son milieu familial de Salses mais qui a par ailleurs laissé le souvenir d'un homme de grande valeur.

Afin de recueillir souvenirs et documents qui pourraient être intéressants le Comité espérantiste roussillonnais s'adresse aux Salséens qui les détiendraient et les prie de bien vouloir les déposer au secrétariat de la mairie

*EL LA  
REGIONA  
GAZETARO*

**Le Travailleur Catalan** 14 Boulevard Kennedy - 66000 PERPIGNAN

## El finestro Catala : la Revista Conflent i la llengua internacional (II)

La lectura atenta del petit libre verd m'ha procurat moltes sorpreses. Veritablement l'esperanto es presentava als inicis com « el llati de la democracia ». Dins les seves edicions dels 20, 21 i 22 d'agost 1905 el diari l'Humanité parla de la utilitat d'aquesta llengua pel món obrer. El mateix any es crea a París una secció « Paco Libreco » - Pau Llibertat que té per finalitat propagar l'esperanto en tots els medis progressistes i sobretot sindicals.

Pero fem plaça a la petita història i deixem Joan Amouroux ens contar la seva encontre providencial amb el seu avi matern, el qual per diverses raons li era completament desconegut.

J.A. : Quan vaig començar aquest treball i tot consultant arxius i « paperasses » vaig trobar una foto representant vuit esperantistes de Perpiñà.

El meu avi matern, amb el qual tinc una gran semblança, s'hi trobava. Era una encontra emocionant, setanta anys després la foto i 30 anys després la seva mort. Em procurava un solid lligam

i un encoratjament a continuar les recerques.

S. : Veig aquí a la pàgina 58 un cartell antifeixista editat a Barcelona uns quants dies abans « La Retirada ». Què es passava en els camps de refugiats pels esperantistes?

J.A. : Tenim una il·lustració d'un membre de les brigades internacionals que ens explica les dures condicions d'existències en el camp de Sant Cebrià i a desgrat d'això l'estrella verda centelleja sempre. Es fa un petit congrés de 28 membres. Malgrat la fam la fred i la captivitat tots volem esperar en un futur lliure. Paris esperantista envia diners i quèviures en els diferents camps del departament; malauradament la segona guerra mundial porta un dolent cop a l'esperança.

S. : I a Perpiñà?

J.A. : Zamenhof era jueu donc-s el carrer del mateix nom es desbaixat. Liech-Walter i Gendre, caps del moviment fets presoners a Alemanya. Lidia Zamenhof que havia donat cursos a Perpiñà viu en el getto de Varsòvia

via i desapareix amb tota la seva família en el camp de Treblinka.

S. : Fem ara un gran salt i parlarem de la situació actual. Em sembla que no es gaire favorable a l'esperanto sobretot a Occident.

J.A. : El gran pes de la llengua anglesa i diguem més aviat americana li porta un gran cop.

S. : Es la travessia del desert?

J.A. : No pas totalment perquè es troben homes i dones amb coratge i tenacitat per continuar. Vull parlar de de Renat Liech-Walter que multiplica les conferències i les entrevistes amb esperantistes forasters i sobretot dels països de l'Est.

S. : Com es fa que el pol d'aquesta llengua d'hagi traslladat en aquells països?

J.A. : Diverses causes, el desig de comunicar amb la resta del món fan que a Rússia sobretot després la destalinització la llengua internacional coneix una revifallà important. El país capdavantat és Hungria seguid de Polònia i de la Bulgària on s'apren com les altres llengües.

S. : I la Xina popular?

J.A. : Per a la Xina als inicis era un mitjà practic de propaganda perquè saben tots que els ideograms no es poden facilitament llegir i doncs tenia manester d'una altra llengua. Ara sembla, després les revistes que rebem regularment que esdevé una eina (outil) per donar a conèixer diversos aspectes d'aquest gran i poderós país.

S. : I per concloure aquesta llarga conversa?

J.A. : Aprofitaré el vostre article per afirmar que l'esperanto a desgrat de persecucions i d'anys negres és sempre viu i girat cap al futur.

P.S. : La revista Conflent redactava en francès es troba en les diverses llibreries, el títol: Histoire du Mouvement espérantiste en Roussillon. Cada divendres a les sis de la tarda, 42 Avenue Général de Gaulle es fa un curs d'iniciació donat per la Sra Baixàs Lable, hi sereu els benvinguts.

*La Susanna  
del Vernet*

## Konkludo de longa artikolo

... Autant de rencontres qui agrémentent l'ouvrage de Jean Amouroux, Marie-Thérèse et Robert Lloancy, trois chercheurs qui ont complété leur travail par quelques aspects linguistiques de l'espéranto, par une bibliographie espérantiste roussillonnaise et par un index donnant les noms de tous les Catalans qui ont, de près, participé à ce merveilleux mouvement vers un langage universel.

ESDE

## ● Revues

« Conflent » n° 137

**Une magistrale étude  
sur le mouvement espérantiste  
en Roussillon**

# ★ ESPÉRANTO ET PHILATÉLIE ★

Voir « La Philatélie Française », n° 371 du 15 mai 1985, page 247

Depuis 1905, tous les ans, hormis pendant les deux guerres mondiales, se déroule en été le congrès universel d'espéranto.

Actuellement « Universala Esperanto-Asocio » (U.E.A.) fondée le 28 avril 1908, à Genève, organise cette importante manifestation espérantiste. La section française est U.F.E., 4 bis, rue de la Cérasie, 75004 Paris.

Le congrès de cette année 1985 a reçu le numéro 70. Ces congrès universels ont donc conservé la numérotation prise dans la liste historique commencée avant la création d'U.E.A. Auparavant les congrès étaient organisés par l'Office central espérantiste dont le siège était à Paris.



Figure 1

Le 4<sup>e</sup> congrès universel de Dresden (en 1908) accueillit quelques réunions d'U.E.A. créée au printemps de la même année. Zamenhof assista à la séance inaugurale et accepta la présidence d'honneur de la nouvelle association.

L'année suivante, dans le cadre du 5<sup>e</sup> congrès universel de Barcelone, Zamenhof assista à nouveau à une partie des travaux d'U.E.A.

En 1910, le 6<sup>e</sup> congrès universel se déroula à Washington sous la présidence de Zamenhof. U.E.A. y tint deux séances de travail mais les principaux dirigeants étaient restés en Europe pour avoir accepté l'invitation des organisateurs du 5<sup>e</sup> congrès allemand d'espéranto, à Augsburg, afin que se déroule en même temps le 1<sup>er</sup> congrès d'U.E.A. Ainsi naquit la double numérotation pour ces deux congrès à vocation universelle : le congrès universel et le congrès d'U.E.A. Le développement d'U.E.A. aidant, la double numérotation durera jusqu'à la disparition de l'Office central espérantiste, en 1922, bien que, depuis 1911, les deux congrès aient bénéficié pratiquement de la même organisation. À partir de 1922 la liste numérique historique est devenue unique.



Figures 2 et 3

75 ans après le « 1<sup>er</sup> congrès », Augsburg vient d'accueillir un congrès universel d'espéranto, le 70<sup>e</sup> de la série.

La principale différence est qu'en 1910 il y avait 120 participants d'une dizaine de pays. En 1985, du 3 au 10 août, ils dépassaient 2 300 de 57 nationalités.

La semaine précédant ce 70<sup>e</sup> congrès, 420 jeunes venus de 32 pays des 5 continents avaient tenu leur 41<sup>e</sup> congrès à Eringenfeld, entre Dortmund et Paderborn, alors que 143 chrétiens de 20 pays se réunissaient déjà à Augsburg pour le 6<sup>e</sup> congrès œcuménique espérantiste.

Le livre que recevait chaque participant signale que pendant la durée du 70<sup>e</sup> congrès — et plus spécialement les 3, 5, 6 et 7 août — un bureau de poste temporaire utiliserait un cachet commémoratif en espéranto (Figure 1). En plus de ces dates prévues j'ai relevé le 9 sur un pli que j'ai reçu. Y a-t-il eu également le 8?

Le hall des sports d'Augsburg était bondé pour la séance inaugurale de ce 70<sup>e</sup> congrès et, parmi les officiels et diplomates venus pour le saluer, nous noterons que M. Gregory Lynch, consul des Etats-Unis, s'est adressé à l'auditoire en parfait espéranto et que S. E. Guo Fen-min,

ambassadeur de Chine, a été ovationné lorsqu'il a souligné que pour son pays les contacts internationaux étaient particulièrement importants et qu'avec beaucoup d'intérêt était attendu le 71<sup>e</sup> congrès universel d'espéranto qui aura lieu à Pékin en 1988.



Figure 4

Du nom de l'empereur romain Auguste, la ville d'Augsburg célèbre cette année son bimillénaire et, dans son discours de bienvenue au congrès, le bourgmestre, M. Hans Breuer, s'avoua impressionné d'être le seul à avoir besoin d'un interprète!

Ce n'était pas d'ailleurs la première fois qu'Augsburg recevait un congrès international espérantiste et, sur le plan philatélique, nous retiendrons le 43<sup>e</sup> congrès de S.A.T. (« Sennacieca Asocio Tutmonda »; Association Mondiale Anationaliste, 67, avenue Gambetta, 75020 Paris) du 25 au 31 juillet 1970 (Figures 2 et 3) et le 50<sup>e</sup> congrès de S.A.T. du 30 juillet au 5 août 1977 (Figure 4). Les figures 2 et 3 varient par la présentation de la date : millésime en entier dans le premier cas ; les deux derniers chiffres du millésime suivis de l'heure de la levée dans le deuxième cas.

Disons enfin que cette année, du 27 juillet au 3 août, le 58<sup>e</sup> congrès de S.A.T. a eu lieu à Amersfoort (Pays-Bas) avec utilisation d'un cachet postal commémoratif — texte également en espéranto. Pour la circonstance le comité d'organisation avait édité une feuille de propagande en quatre langues (néerlandais, allemand, français et espéranto) reproduisant quatre timbres espérantistes et la vignette du congrès.

Merci à tous ceux qui m'ont écrit de ces congrès 1985 et particulièrement à J. Vincent (Baugé), Dr Y. Vierne (Montpellier), J. Hénin (La Canourgue), L. Giloteaux (Croix), R. Péault (Draveil) et J.-L. Texier (Cerny) pour m'avoir adressé des renseignements qui m'ont permis de rédiger cette chronique.

Ont parlé d'« Espéranto et Philatélie » dans leurs colonnes : « Sudfrancia Stelo » (bulletin de la Fédération d'Espéranto Languedoc-Roussillon) - n° 93 - 2<sup>e</sup> trimestre 1985.

Jean AMOURoux



Se vi aspiras puran aeron, florriĉajn herbeojn,  
abi-kovritajn montojn ĉirkau lagoj, tiam partoprenu en la

## 78-a FRANCA KONGRESO DE ESPERANTO en Gerardmer, la perlo de la Vogejoj, dum Pentekosto, (de la 16-a ĝis la 20-a de majo 1986)

Atentu ke, pentekoste en Gerardmer, pli svarmas la turistoj ol la hoteloj, kaj ke post februaro 1986, la LKK ne plu respondecos pri rezervado de ĉambro. Aliĝu frue!



Kotizoj ĝis la 31/12/1985

kongresan(in)o	160 F
geedzoj	230 F
junuloj	100 F
eksterlandano	senpage

## LITERATURO

El Jules Renard (1864-1910) : "Histoires naturelles"

NATURSCIENCAJ HISTORIOJ: LA BUFO. (Tradukis C. Boumal)

Naskiĝinta el Stono, ĝi vivas sub Stono kaj tie fosos por si tombejon. Mi ofte vizitas ĝin, kaj ĉiufoje kiama mi levas ĝian Stonon, mi sentas timon ĝin retrovi kaj timon, ke ĝi forestu.

Jen ĝi. Kaŝita en tiu ŝirmejo seka, pura, streta, vere propra, ĝi okupas ĝin plene, ŝvela kiel avarula burso.

Cu la pluvo ĝin pelas eksteren, ĝi venas al mi, faras kelkajn pezajn saltojn kaj haltas, apogite sur la femuroj, kaj min alrigardas per siaj ruĝigintaj okuloj.

Se la maljusta mondo ĝin traktas kiel leprulon, mi ne timas kaŭri apud ĝi kaj proksimigi al la ĝia mian homvizaĝon.

Poste, mi superfortos reston de naŭzo, kaj mi karesos vin per mia mano, bufo ! En la vivo, oni glutas aferojn, kiuj pli kaŭzas naŭzon !

Tamen, hieraŭ mi estis sentakta. Gi fermentis kaj likis per ĉiuj krevitaj pustuloj. - Povra amiko mia, mi diris al ĝi, mi ne volas vin ĉagreni, sed, Dio ! Kiel malbela vi estas !

Gi malfermis la bušon infanecan kaj sendentan, eligante varman spirajon, kaj respondis al mi, per apenaŭa brita akcento:

- Kaj vi ?



\*\*\*\*\*

## VOJAĜO

(Ges. Diez partoprenis antaŭ kelkaj semajnoj en vojaĝo tra Turkio, organizita de la Universitato de la tria aĝo de Montpellier. Jen kelkaj notoj pri tiu 17-taga vojaĝo)

"En Istanbul ni havis la plezuron renkonti S-ron Enver Yalçin kaj lian edzinon. Ili devenas de Irano, kienambaŭ iras regule kaj facile. Samtempe ni konatiĝis kun juna Turkio, novbakita esperantisto kaj kun du polaj junulinoj, kiuj vizitis Turkion. Ges. Yalçin, kiuj okupigas pri turismo, loĝas en Bursa (Azio) sed ĉi-somere laboris en Istanbul. Pro tio, kvankam ili aliĝis al la UK de Augsburg, ili ne povis partopreni..."

Kelkaj impresoj : en la grandaj kaj turismaj urboj, Ŝajnas, ke oni povas trovi ĉiujn varojn, kiuj estas iomete malmultekostaj por ni, Francoj, sed ne ĉiuj Turkoj povas ilin aĉeti ĉar la vivniveloj estas tre malproksimaj unuj de la aliaj.

Estas belegaj domoj sed ankaŭ multege da domaĉoj ĉirkau ĉiuj urboj: la kamparanoj, kiel ĉie, imagas, ke oni pli bone vivas en la urboj; ankaŭ, ĉar la bienuloj aĉetas traktorojn, estas imponaj bienoj kaj kabanaĉoj. Cni sentas malriĉecon sed ne estas almozuloj sur la stratoj. Ĉu almozi estas malpermesate ?

La homoj svarmas, la urba trafiko estas intensa sed ne estas multe da videblaj policanoj.


KULTURA

ESPERANTO



DOMO

GRÉSILLON



Multaj esperantistoj jam aûdis pri Grejizono kaj La Chaux de fonds. Hole kôlkaj ne scias, ke la funkciado de tiuj centroj ne estas limigata al la somera sezono. Jen kelkaj informoj pri la renkontoj, staĝoj..antaŭvidataj en 1986.

#### Kultura Esperanto-domo de Grésillon F.49150 Baugé

29 III - 2 IV : Pedagogia seminario	30 III - 5 IV : Internacia renkonto de infanoj
15 VI - 29 VI : Internacia renkonto	29 VI - 20 VII : Prelegoj kaj kursoj
21 VII - 10 VIII : Kursoj	10 VIII - 23 VIII Informatiko per Esperanto
17 VIII - 31 VIII : Renkonto de blindaj esperantistoj.	

\* \* \*

Kultura Centro Esperantista - Postiers 27 Poštakao 771 CH-2301 La Chaux-de-fonds.

Esperanto-staĝoj por komencantoj kaj por progresantoj:

20/24 I ; 17/21 II ; 24/28 III ; 21/25 IV ; 19/23 V ; 23/27 VI, ktp.

Cni povas tranokti en ĉambro 1- 2- aû 4-lita aû luproeni loĝejon 2- 3- 4- aû 5-litan.

En Julio kaj Aûgusto, la staĝoj okazas ĉiusemajne.

\* \* \*

Internaciaj ferioj kulturaj kaj sportaj:

6/11 I ; 13/18 I ; 27 I- 1 II ; 3/8 II ; 10/15 II ; 24 II - 1 III ; 3/8 III; 10/15 III; 17/22 III; 7/12 IV ; 14/19 IV ; 28 IV - 3 V ; 5/10 V ; 12/17 V; 26/31 V ; 2/7 VI;

9/14 VI ; 16/21 VI, ktp. (uzataj lingvoj : esperanto, la franca kaj la germana).

Ankaû okazos feriado por infanoj kaj esperanto-familioj de la 14a ĝis la 26a de Julio. Fine, oni antaŭvidas seminarion pri la Cseh-metodo en Julio.

\* \* \*

Kultura Centro Esperantista  
Centre culturel espérantiste  
Esperanto-Kulturzentrum  
Centro culturale esperantista  
Center culturel esperantist  
Esperanto Cultural Centre

Postiers 27  
Poštakao 771  
CH-2301 La Chaux-de-Fonds  
Svislando  
Telefono 039 26 74 07  
Poštakonto 23-2921

**KCE** KULTURA  
CENTRO  
ESPERANTISTA

#### FINO de la raporto pri Turkoj.

... La Turkoj aspektas laboremaj, afablaj, komplezemaj. La Ŝtato estas laika sed 99 % de la popolo estas islamaj kaj kvinfoje, ĉiutage de la semajno, oni aûdas la sonbendigitan alvokon de la muezinoj por preĝi. En iu ajn loko oni ne povas ne aûdi tiun ege laûtan voĉon, ĉar la minaretoj estas nombraj. Ne nur vendrade sed ankaû la aliajn tagojn la viroj frekventas la moskeojn.

Por skribi oni uzas oficiale la eûropajn literojn, kaj la Turkoj laûte diras, ke ili ne estas Araboj -estas vere . Tamen ne nur en la moskeoj kaj malnovaj palacoj, arabeskoj, koranaj paragrafetoj, arabaj skribajoj estas videblaj, eĉ en montrufenestroj, sur reklampaneloj, en nia aûtobuso... Cu estas nur honore al la arabaj turistoj ? Ni iomete dubas... Kia estos la estonteco? "

\*\*\*\*\*

Dankon pro la raporto. Ni petas tiujn el niaj legantoj, kiuj havas la okazon vojaĝi, ne forgesi raporti, eĉ koncize, por nia bulteno. Ni jam scias, ke pluraj partoprenos en la kongreso de Pekino. Ni antaûdankas ilin !

\*\*\*\*\*

Lorsque nous présentons l'espéranto, on nous objecte parfois que l'anglais est déjà LA langue internationale.

Une telle affirmation mérite quelques commentaires. Quelle est la diffusion réelle de l'anglais? Convient-il comme langue internationale pour sa facilité, sa régularité, etc ? Sa diffusion est elle "innocente", etc...?

Disons d'emblée que les espérantistes connaissent souvent une ou plusieurs langues étrangères, qu'ils reconnaissent l'intérêt de l'anglais pour découvrir les pays et les peuples anglophones...comme celui de l'allemand pour avoir accès à l'Europe du Centre et du Nord, de l'espagnol pour connaître un pays voisin et l'Amérique du Sud, du portugais pour mieux apprécier ce géant du 21<sup>e</sup> siècle que sera le Brésil, l'italien pour retrouver une culture inégalable, l'arabe.... le russe... ou le chinois pour faire connaissance avec le quart de l'humanité,etc, etc...

Chacun d'entre nous est également conscient du fait que l'anglais s'est taillé une place importante dans la technique, le commerce, le tourisme...mais si beaucoup de gens parlent un peu d'anglais, peut-on dire que le problème de la communication soit résolu?

La communauté anglophone représente environ 9% de l'humanité. Pour un anglophone, 10 non anglophones...

Au niveau de la maîtrise de l'anglais par ces non anglophones, l'actualité fourmille de détails intéressants. Ce jour même, un homme politique français, bien coté dans les sondages, prétend que les traducteurs se sont trompés dans l'interview, pardon l'entretien accordé au magazine américain "Newsweek". La semaine dernière, dans l'émission "Droit de réponse" sur l'exportation, un participant signalait que lorsqu'on appelait au téléphone des entreprises françaises capables d'exporter, dans près de 80 % des cas on ne trouvait personne capable de répondre en anglais, même de façon très sommaire. Le mois dernier, Mr Reagan, après avoir rencontré Mr Gorbatchev, avouait que lorsque la discussion s'animaît, les interprètes ne suivaient plus et que les "bons mots" qu'il lançait pour détendre l'ambiance n'avaient aucun effet. A la même date, un trafiquant irlandais était arrêté à Bruxelles avec un milliard de faux dollars (pas moins). On chercha en vain un interprète anglais-flamand pendant 24 heures. C'était, il est vrai, un week-end. On relâcha notre homme, faute de l'avoir entendu... L'histoire est symbolique puisque Bruxelles est le siège d'instances européennes, dont nous tairons, par pudeur, les dépenses énormes engagées pour les traductions puisque l'anglais y est langue officielle au même titre que six autres langues. Passer du grec au danois n'est pas évident ! Avec l'arrivée du Portugal et de l'Espagne, il y aura 9 langues officielles (soit des équipes de 72 traducteurs au lieu de 42 précédemment). Comment s'étonner des problèmes de l'Unesco, de l'ONU, etc ? Nous recommandons la lecture de l'article de Claude Piron : "Confession d'un fou européen", sur son expérience de traducteur à l'ONU.

Pour compléter l'histoire belge ci-dessus, en voici une autre typiquement française, signalée à St Tropez, il y a deux ans. La célèbre maréchaussée suspectait de drogue deux jeunes Anglais. Contournant leur caravane et découvrant des traces d'une poudre jaunâtre, destinée à éloigner les chiens, ils leur demandèrent:

- Drogue?

- Yes, dog ...répondirent les Anglais, désignant la poudre.

Dog signifie chien en anglais.... Les gendarmes entendirent "drogue" et nos Britanniques furent embarqués; il fallut l'intervention du Consul de Grande Bretagne pour les faire relâcher 48 heures plus tard! direz-vous.

-Mais nous aurons 80% de bacheliers en l'an 2000! En fait, le Ministre de l'Education Nationale a parlé de 80% d'une classe d'âge atteignant le niveau du bac. Actuellement, sur 100 élèves d'une classe d'âge, 37 atteignent le niveau du bac et 27 obtiennent le diplôme. En admettant qu'un tiers de ces bacheliers en titre parlent l'anglais correctement, on arrive à 9% de la classe d'âge de départ. L'Institut de Cybernétique de Faderborn (RFA) a évalué que, suivant l'origine, il fallait 1500 à 2000 heures d'étude pour acquérir un bon niveau d'anglais, ce que nous appellerons "parler" la langue. Nos jeunes consacrent environ la moitié de ce total horaire à l'étude de l'anglais. Par comparaison, il faut 150 à 200 heures d'étude pour "parler" l'espéranto.

Nombre de raisons rentrent en ligne de compte dans cet insuccès relatif de l'enseignement des langues; il serait trop long de les exposer....

(à suivre)

\*\*\*\*\*

SEMAJN-FINA ESPERANTO LINGVO-STAGO : STAGE DE FIN DE SEMAINE DE LANGUE ESPERANTO

La federacio Langvedoko-Rusiljono organizas esperanto-lingvostagon de la 8a ĝis la 11a de Majo 1986. Tiu stago okazos en Kastelo "Cassan" apud Roujan, je 20 km norde de Béziers; facile alirebla per aŭtomobilo; aŭtobuso en Béziers kun haltejo antaŭ la kastelo; stacidomo SNCF en Magalas (8 km). Detaloj en la venonta bulteno aŭ petu ilin. Dulitaj ĉambroj, kelkaj unulitaj kun littukoj. Ebleco kampadi; kumportu tualet- kaj mangotukojn. La prezo por la tuta stago -kompleta pensiono- estas 360 F. La estraro petas antaŭagon de 40 F por ĉiu partoprononto. Por alfronti la diversajn elspezojn, ni petas aligkotizon de 20 F. Ni esperas organizi 3 diversnivelajn kursojn -eble 4 - el kiuj 1 por iniciado de "veraj komencantoj". Ni alvokas la kapablulojn por gvidi kurson aŭ kontribui al la distraj veteroj. Sendi aligilon, 60 F kaj afrankitan koverton al: Cercle Biterrois d'Esperanto 9, Rue Georges Picot 34500 Béziers. Por informoj vi povas telefonri al 67 31 13 18 aŭ 67 31 13 46 aŭ 67 38 03 52, prefere ĉe la mangohoroj. Ni kalkulas pri via partopreno kaj tiuj de viaj gelernantoj. Aliĝu kiel eble plej baldaŭ. Antaŭdankon !

\*\*\*\*\*

La fédération du Languedoc-Roussillon organise un stage d'espéranto du 8 au 11 Mai 1986. Ce stage se déroulera au Château de Cassan, près de Roujan, à 20 km au nord de Béziers. Actes facile par la route; autobus à Béziers avec arrêt devant le château; gare SNCF à Magalas (8 km). Des précisions vous seront données dans le prochain bulletin ou sur demande. Chambres à 2 lits, quelques unes à 1 lit, les draps sont fournis. Possibilité de camper. Apporter linge de toilette et de table. Le prix pour le stage en pension complète est de 360 F. La direction du château nous prie de verser 40 F d'arrhes par participant. Pour faire face aux diverses dépenses de secrétariat, nous demandons un droit d'adhésion de 20 F. Nous espérons pouvoir organiser 3 niveaux de cours - peut-être 4 - dont un d'initiation pour les "vrais commençantes". Nous faisons appel à tous ceux qui le peuvent pour guider un cours ou pour contribuer à l'animation des soirées. Envoyer le bulletin d'adhésion, 60 F et une enveloppe timbrée avec votre adresse à: Cercle Biterrois d'Espéranto 9, Rue Georges Picot 34500 Béziers. Pour information, vous pouvez téléphoner à: 67 31 13 18 ou au 67 31 13 46 ou au 67 38 03 52, de préférence aux heures des repas. Nous comptons sur votre participation et sur celle de vos élèves. Inscrivez-vous le plus vite possible. Remerciements anticipés.

\*\*\*\*\*

ALIGILO

- BULLETIN D'ADHESION

NOMO kaj persona nomo ( Nom et prénom)

ADRESO (adresse):

Mi partoprenos la tutan stagon (je participerai au stage complet): jes (oui)/ ne (non)

Mi alvenos la    je la    kaj foriros la    je la    horo  
(j'arriverai le    à    h et partirai le    à    h.)

per privata aŭtomobilo, buso, trajno (en voiture particulière, bus, train)

KURSO kaj nivelo (cours et niveau) ..... ou:je suis tout à fait débutant.

EKZAMENO : mi deziras trapasi, la 1an, la 2an, la 3an ekzamenon (forstreku se necese)

Ni organizos ekzamenojn, se vi sufice frue konigos al ni vian deziron.

ALLIAJ INFORMOJ AŬ DEZIROJ (autres renseignements ou souhaits):

Mi pagas 60 F (antaŭpago 40F + kotizo 20F):(je verse 60F:40F d'arrhes + 20F de cotisation) al (à): Cercle Biterrois d'Espéranto.

Mi aldonas afrankitan koverton kun mia adreso (je joins une enveloppe timbrée à mon adresse)

Subskribo/Dato

Signature/Date.

\*\*\*\*\*

# VRUMM!



Tiu sunprotektilo estas vendata de la fedracia libroseruo; ĝi kostas 20 F nur. Okulfrapa-propagandilo, ĉu ne?

I.E.K.A.  
DENOVE  
STARTAS



La Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista post sia jara kunveno dum la UK en Aùgsburgo, decidis relanĉi sian agadon per pli granda informado al la esperantistaj aŭtistoj; informoj pri la aŭtomobilaj aferoj en ĉiuj branĉoj : sekureco, ŝpareco, prizorgado, fabrikado, turismo, novajoj, ktp.. Tiuj informoj aperos sub formo de fak-artikoloj en viaj kutimaj ĵurnaloj aù revuoj laŭ ritmo ne regula sed konstanta. Ili ankaŭ pritraktos la aktualajojn en la aŭtaj medioj.


Vi povas helpi al pli granda disvastigo de la laboro per aliĝo (aù donaco se vi jam aliĝis) al la sekretario/kasisto : (René Bastong - 84,bis,Rue Henri Prou

(78 340 Les Clayes sous bois  
pêk : 18 626 80 H Paris

Aliĝo : 35F (por via tuta vivo!). Kroma insigno: 17 F.


Oni planas la eldonon de fak-vortaro.

## ĈINA HUMURO



Birdo kaj homo

de GUANG MINGIN



Patro kaj la filo

de LIU CINGJUI




Transplantado de floro

de GJA GAUZENG

# DISTRAPAGO

Krucvortoj de René Raynaud : (R= Radiko)

Horizontale: I: Akcesorajoj de hispanaj dancistinoj. II: Malfeliĉa okazajo (R) - 24 horoj (R) III: moviĝi. Tia vulpo ne ekzistas. IV: manskribitaj aŭ tajpitaj ekzempleroj de verko destinita al presigo. V: Ekzisti (R). Konjunkcio. Monabundo. VI: konscie preter-lasi (R). Nombro. VII: Adverbo aŭ senfinaĵa anagramo de virnomo. Kampoj de agadoj. VIII: Senartifika (R). Odro (R). Prepozicio. IX: Roma monero (R). Ago inda je infano. X: Kasavo (R). Surfaco entenita en orbito de planedo. XI: Specio de gado (R). Patr(o) en malordo. Trinkajo (R) XII : Koncernantaj la kaŝpolicon.



\*\*\*\*\*

Vertikale: 1: Brile malhelruĝa. Persona pronomo. 2: Kapo de akcipitro. Roma monero (R). Kardinala punkto. 3: Brili. Parto de kurbo (R). 4: Eligui ion el io, kio ĝin entenas. Venena serpento (R). 5: Nomepiteto de morbo. Persona pronomo. 6: Maljes. Likvajo uzata por anestezo (R). 7: En Januaro. Direkti la publikigon de gazeto. 8: Gento. Prefikso por neaj vortoj. En la mezo de pano. 9: Volapuko estas grandparte tia lingvo. Ĉe la sojlo de palaco. 10: La inflamoj ne malaperos se ĝi estas inverse legitaj. Nomo de litero. 11: Indonezia insulo. Rilata al organa tubeto. 12: Etero, kiun oni ekstraktas el kreozoto de fago (R). Turka guberniestro (R).

\*\*\*\*\*

Solvo de la numero 94:

Horizontale: I: Maksim' - Biz'. II: Akvamarin' - Ve. III: Am - Landlim'. IV: Sarabando. Ti. V: Tetra. Dinaro. VI: ii - Loteri' - VII: Osmozo. Azena. VIII: Via-iks-io. IX: Sabat' Ombr'. X: Rit' - Elit' - Era'. XI: Relikv' - Tub'. XII: Moroz' - Trol'.

Vertikale: 1: Majstroverk'. 2: AK-Ae-Si. 3: Kvartimastro. 4: Samario - Er'. 5: im-Ba-Zibelo. 6: Mala-Lokaliz'. 7: Rando-Stik'. 8: Bindita. Tv. 9: Indonezio. Areometr'. 11: Vitrin'. Bruo. 12: Kemio. Agrabl'.

\*\*\*\*\*

Solvo de la senvokala proverbo: Se ĉiu balaos antaŭ sia pordo, tiam en la tutaj urboj estos en ordo.

\*\*\*\*\*

LITER-ENIGMO: En ĉiu serio da senordaj literoj sin kaſas la nomo de frukto (N.B. La unua litero estas je sia loko).

1: C R O O I T N. 2: P I O K R E S. 3: M L D O G I A. 4: K T O A A S N.  
5: D K I A O T L. 6: V O E N R B I. 7: M T L O R E I. 8: C O O N D I I.

\*\*\*\*\*

FELIĈAN



NOVJARON



1986



\*\*\*\*\*  
Por la venonta numero sendu viajn kontribuojn plej malfrue la 17an de marto  
al J. Hénin .48500 La Canourgue.

\*\*\*\*\*